

SES-SK 2014-bulteno

2014-06-06



Informoj por aliĝintoj al la Somera Esperanto-Studado 2014, Nitra, Slovakio:

Elkoran dankon pro via aliĝo! Ni rekomendas al vi trovi iom da tempo por tralegi ĉi-subajn informojn por esti bone preparita por senproblema alveno kaj ĉeesto en SES SK 2014.

Rimarko: bonvolu plusendi tiun ĉi mesaĝon al aliaj koncernuloj, se ili aliĝis per via retpoŝt-adreso, eventuale sciigu ilin pri la enhavo de ĝi.

Gravaj informoj

1. Pagoj:

Bonvolu memori, ke via aliĝo estos valida nur post ricevo de la antaŭpago por la aranĝo (pago de aliĝkotizo). Sen tio, ni ne povas garantii rezervitajn tranoktojn, manĝojn kaj aldonajn servojn (vi povas pagi antaŭe ankaŭ la tutan sumon necesan). Se vi ankoraŭ ne pagis la aliĝkotizon, faru tion laŭeble baldaŭ.

2. Mono:

En Slovakio validas la valuto „eŭro“, mallonge EUR. Por la aranĝo eblas pagi surloke nur per eŭroj (ni ne akceptas aliajn valutojn, monŝanĝejo ekzistas en la urbocentro, ĉ. 1 km for). Dum la aranĝo eblas aĉetadi, ekzemple en bufedo aŭ libroservo, same nur kontraŭ eŭroj.

3. Alveno/foriro:

La aranĝo komenciĝas la 12-an de julio posttagmeze (alveno eblas ekde la 14-a horo) kaj finiĝas la 20-an de julio posttagmeze, je la 13-a horo. Kaze de bezono eblas veni 1 nokton pli frue, kaj eventuale resti kelkajn noktojn post la aranĝo, kontraŭ kroma pago. Se vi bezonas kromajn tranoktojn, nepre informu nin antaŭ la 1-a de julio, por povi rezervi lokojn.

Adreso de la SES-ejo:

SES 2014 okazos en la studenthejmo Zobor, kies plena adreso estas:

Študentský domov Zobor

Univerzita Konštantína Filozofa v Nitre

Dražovská cesta 2

949 01 Nitra

En tiu ĉi konstruaĵo partoprenantoj loĝos, manĝos, kaj okazos instruado kaj tuta programo.

Kiel atingi SES-ejon:

La urbo Nitra situas 90 km for de la slovakia ĉefurbo Bratislava, 160 km de Vieno, ĉefurbo de Aŭstrio, kaj 155 km de Budapeŝto, ĉefurbo de Hungario.

Por vojaĝi al Nitra ni rekomendas al vi uzi busan trafikon, ĉar trajnoj el Bratislava veturas ege malofte dum la tago (ofte kun ŝanĝoj). La urbo Nitra havas tre bonan buskonekton kun Bratislava. La lasta vespera buso forveturas el Bratislava al Nitra je 22:30. La vojo daŭras ĉirkaŭ unu horo kaj duono. Por serĉi taŭgan konekton vidu www.cp.sk. (sube dekstre eblas ŝalti la lingvon al la angla aŭ la germana)

De la flughaveno en Bratislava. Veturu per la buso n-ro 61, kiu alportos vin rekte de la flughaveno (Letisko) al la ĉefa trajn-stacidomo (Hlavná stanica). La stacidomo estas la lasta haltejo, la veturo daŭras 25 minutojn, bileto kostas 0,90 EUR (ĝi validas 60 minutojn, semajnfine 90min. Kaj eblas libere ŝanĝi ene de tiu tempo la veturilojn) kaj aĉetebblas en la flavaj aŭtomatoj en la bushaltejo aŭ en la gazet-giĉetoj. De tie per trolejbuso nr. 210 aŭ per la buso nr. 21 vi povas atingi busan stacidomon (Autobusová stanica Mlynské Nivy). La vojaĝo daŭras 8 minutojn (3 haltejoj). Vi povas kontroli ĉiujn itinerojn kaj plani vian vojaĝon en Bratislava ĉe <http://imhd.zoznam.sk>.

De la flughaveno en Vieno (Wien). Ekzistas bona rekta busa konekto inter Viena flughaveno (Flughafen Schwechat) kaj ĉefa busa stacidomo en Bratislavo (haltejo Autobusová stanica).

Vi povas kontroli itineron kaj aĉeti busajn biletojn anticipe ĉe http://www.slovaklines.sk/index_en.html. La biletoj ankaŭ aĉetebblas rekte en la buso, kaze ke estas liberaj lokoj.

De Bratislava al Nitra. Nitra estas plej facile atingebla per busoj, pro tio rekomendindas al ĝi veturi de la ĉefa busa stacidomo en Bratislava (Autobusová stanica). Sed ekzistas ankaŭ fervoja konekto (sed multe malpli ofta kaj malpli komforta). Pli detale itinerojn por via alventempo vi povas kontroli ĉe www.cp.sk.

De Nitra (busa kaj fervoja stacidomoj) al Zobor.

La vojaĝo daŭras ĉirkaŭ 17 min. Busoj, kiuj iras al SES-ejo el trajna kaj busa stacidomoj, estas jenaj:


- 2, 4 (direkto Dražovce)
- 10 (direkto Zobor, Lanovka)
- 25, C, 1 (direkto Zobor, Nemocnica)
- 27 (direkto Štitáre)

Enira stacio nomiĝas:

- Železničná stanica Nitra
 - Rázcestie Autobusová stanica
 - Rázcestie Železničná stanica
- (dependas de tio, ĉu vi venos per trajno aŭ per buso)

Stacioj apud SES-ejo nomiĝas:

- Pod Zoborom (malpli taŭge)
- Amfiteáter (ideale, plej proksime)



Kiel atingi SES-ejon de la plej proksima *bushaltejo Amfiteáter*

Vi povas kontroli itineron pli precize ĉe <http://imhd.zoznam.sk/nr/public-transport.html> (paĝaro de publika transporto en Nitra).

- Per taksio: Taksioj estas troveblaj kaj ĉe la trajna, kaj ĉe la busa stacidomoj. La vojaĝo de la stacidomoj ĝis la SES-ejo kostas ekde 2,50 ĝis 4 EUR. Flavaj taksioj ĉe la trajna stacidomo estas ĝenerale malplej kostaj. Ni rekomendas do uzi la flavajn, de la firmao Moje Taxi (www.mojetaxi.sk). Vi povas ankaŭ voki/mendi la taksion telefone: 00421 903 553 553.

4. SES-ejo:

En la SES-ejo estos je dispono bufedo, drinkejo kaj libroservo.

En la SES-ejo ne estos aparta komputila ĉambro (sed jes kelkaj komputiloj en la koridoro por uzi), sed senpaga sendrata reto estos atingebla. Ĝin eblos uzi per propraj porteblaj komputiloj. (Bv. do kunporti tiun vian, se vi bezonos retumi pli multe dum la aranĝo.)

En la konstruaĵo de SES estas malpermesita fumado – bv. respekti tion kaj laŭbezone fumi nur ekster la areo. Fumado laŭleĝe estas permesita en drinkejo, sed ni petas vin respekti nefumantajn esperantistojn kaj ĉiam fumi nur ekstere.

En la SES-ejo je dispono estos sporta halo kaj ankaŭ sporta ekipo (pilkoj, badmintonaj rakedoj, ktp.). En teritorio de la SES-ejo ekzistas du tenisaj ludejoj, kiujn eblos lui kontraŭ krompago.

En la SES-ejo troviĝas publika lavejo – 2 lavmaŝinoj kaj 1 sekigilo estas je dispono por ĉiuj – lavado kostas 2 EUR. Vi do povos lavi viajn vestaĵojn tie kaze de bezono.

5. Manĝoj:

Manĝado okazos en la manĝejo de la SES-ejo mem (laŭ tempoj indikitaj en la program-tabelo: 7:30-9:00, 13:00-14:00, 19:00-20:00).

Ĉiuj, kiuj ne mendis manĝojn, devos mem prizorgi manĝojn. En la SES-ejo funkcios eta bufedo/vendejeto, kie eblos aĉeti simplajn manĝojn. Apud la SES-ejo funkcias kelkaj restoracioj aŭ picejoj. En la SES-ejo ekzistas en ĉiu etaĝo (ĉiam fine de la koridoroj A kaj B) kuirejetoj (tamen sen granda kuir ekipaĵo) por memzorgantoj. Enestas forno kaj mikroondo.

Se vi volas mendi manĝojn, sed ne faris tion en via aliĝilo, bonvolu skribi al dorota@ikso.net.

Kafopaŭzo:

Dum la antaŭtagmeza instruado okazos en la manĝejo kafopaŭzo kun senpagaj teo, kafo kaj akvo. Bonvolu kunporti **propran** kafo-tason por tiu celo. Por ŝpari la vivmedion ni volas eviti uzadon de plastaj glasoj kaj tasoj. Se vi ne kunportos propran tason, vi povos aĉeti kontraŭ 2 eŭroj surloke ceramikan *lernu!*-tason, ornami ĝin laŭ via plaĉo kaj uzadi ĝin dum la semajno.

6. Aĉetoj

La SES-ejo troviĝas proksime de la urbocentro (la «Malnova urbo») de Nitra. En la urbocentro troviĝas apotekoj, trinkejoj, kafejoj, restoracioj, la grandaj komercdomoj Tesco kaj Galeria Mlyny.

Rimarko: vi povas rigardi nian [Google-mapon de la urbo](#) kun markigo de ĉiuj gravaj lokoj.

7. Ĉambroj, tendoj, prelegejoj:

Je dispono estas du-, tri- kaj kvar-litaj ĉambroj en la studenthejmo. Ĉiu duopo de ĉambroj havas komunan necesejon kaj duŝejon (aldone fridujon en la koridoro). Vi ricevos litotukojn, sed bonvolu kunporti propran bantukon.

La studenthejmo proponas "normalajn" (ordinarajn) kondiĉojn por tranoktoj, do ne atendu grandan lukson. Se vi tamen volas loĝi pli lukse, kontaktu nin pri viaj deziroj aŭ rekte iun el la apudaj pensionoj, hoteloj: Pensiono Zoborska, Pensiono Hoffer, Vila Aria, Club Hotel Amfiteater.

Tendumantoj devas kunporti propran tendon, dormosakon kaj matracon. Oni povos starigi tendojn en la korto de la SES-ejo. Tendumantoj havos eblecon uzi necesejon kaj duŝejon en la SES-ejo.

La studenthejmo havas kelkajn stud- kaj preleg-ĉambrojn, sportan halon kaj grandan salonon por pli grandaj programeroj. Ĉiuj ĉambroj estos uzataj nur por oficialaj programeroj. Se vi bezonas prelegĉambron por iu programero, bv. kontakti organizantojn anticipe aŭ dum la aranĝo.

8. Utilaj ligiloj rilate al vojaĝado kaj tranoktado en Slovakio:

Vojaĝ-horaroj

<http://cp.atlas.sk/> - trajnoj, busoj, aviadiloj, urba trafiko, kombinaĵoj trajnoj + busoj [sk, en, de]

<http://www.imhd.zoznam.sk> – urba trafiko por diversaj slovakiaj urboj [sk, en]

Mapoj

<http://maps.google.com/> [diversaj lingvoj]
<http://www.supernavigator.sk/navigator/> [sk, cs, en, de, hu]
<http://mapy.hiking.sk/> - turistaj mapoj de Slovakio [sk]

Loĝado

<http://www.ubytovanienaslovensku.eu/> [diversaj lingvoj]
<http://www.limba.com/sk/slovensko/ponuka> [diversaj lingvoj]
<http://www.prenocuj.sk/> [sk, cs, en, de, pl, hu, es]

Turistaj informcentroj

<http://www.slovakiatravels.com/sections/comunity/linkRegional-sk> [sk, en, it, fr]

Slovaka lingvo

<http://slovake.eu> — paĝaro por lerni la slovakon; ĝi enhavas ankaŭ minikurson kun utilaj frazoj por turistoj!
[sk, cs, en, de, pl, lt, fr, eo, es, ru, hu]

Se vi tamen bezonus iun aldonan informon aŭ konsilon, bonvolu skribi pri tio al: petro@ikso.net

Programo

9. Instruado:

Instruado okazos en pluraj grupoj laŭ la lingvonivelo, ĉiam antaŭtagmeze (9.00-13.00). Dum la alvena tago, sabate posttagmeze (17:00-19:00), okazos **mallonga testado**, por ke la instruistoj povu disdividi vin en grupojn laŭ viaj lingvo-scioj. **Ni forte rekomendas al ĉiuj ĉeesti ĝin!**

Tutaj komencantoj, kiuj absolute ne scipovas la lingvon, povos veni en la tempo de testado al la klasĉambro por komencantoj – kie ili havos enkondukan lecionon kun sia instruisto. (detalojn demandu dum la registriĝo aŭ serĉu post via alveno en la program-tabulo)

Krom la kutima instruado okazos:

Kurso: Esperanto-literaturo kaj kulturo

Du verkistoj kaj tradukistoj: Jorge Camacho kaj Nicola Ruggiero, steluloj de la Esperanto-literaturo gvidos la kurson por tiuj el vi, kiuj emus ekscii pli pri nia esperanto-kulturo, ĉefe pri la literatura flanko de ĝi. Temoj de la kurso: historio de E-literaturo, nuntempa stato, verkado, tradukado, poezio, prozo... kaj multon pli eblos lerni dum la kurso – rekomendita por progresintoj de Esperanto.

KER-ekzamenoj

Ĉi-jare eblos denove pasi KER-ekzamenojn dum SES (**kaze de sufiĉaj aliĝoj!**). UEA-ITK denove ebligas la okazigon de la novtipaj [KER-ekzamenoj](#). Kondiĉe ke sufiĉaj interesiĝantoj aliĝos ĝis la 26a de junio, ekzamenoj povos okazi je ĉiuj tri ekzistantaj niveloj: B1, B2 kaj C1. Eblos trapasi la kompleksan ekzamenon (t.e. la skriban kaj la parolan partojn), sed ankaŭ aparte iun el du tipoj. (Minimuma bezonata aliĝ-kvanto estas 10 homoj en 1 grupo/nivelo.)

Je sukcesa ekzameniĝo la ŝtate agnoskata hungara ekzamenocentro ITK eldonas kvarlingvan diplomon por la kandidato.

Por aliĝi al la ekzameno bonvolu viziti: <http://edukado.net/alighilo?id=2014SK-NITR>

Atentigo: la kosto de la ekzameno NE estas en la aliĝkotizo por SES – la ekzameno estas pagenda aparte, rekte surloke. Informoj pri la kotizo troveblas [ĉi tie](#).

10. Distra programo:

En aparta dokumento ni sendos antaŭ la aranĝo provizoran program-tabelon de SES. Ĝi ne estas kompleta; pluraj aferoj aldoniĝos al la programo dum la sekvaj tagoj kaj eĉ dum la aranĝo mem. Same povas eventuale ŝanĝiĝi tempoj de unuopaj prelegoj kaj prezentoj.

Dum la ekskursaj tagoj estos preparita aparta programo por tiuj, kiuj ne ekskursos – prelegoj, manlaboroj, sportoj k.a. (informoj pri tio aperos surloke). Aldone eblos pasigi liberan tempon ekster la oficiala programo organizata de la SES-teamo (ekz. naĝante en naĝejo, ludante, promenante tra arbaroj, urbo k.s.).

Rimarko: Ĉiam kontrolu programtabulon en la SES-ejo (kiu estos ĉe akceptejo, ĉe ĉefa enirejo) por ricevi plej ĝustan kaj detalan informon pri la programo. Ĉiuj aliaj fontoj de la programo (ekzemple tiu ĉi bulteno) povas enhavi malnovan kaj ne plu aktualan programon.

11. Via kontribuo:

Vi mem povas ankaŭ kontribui al la programo de SES: proponi ion interesan, kion vi dezirus prezenti al aliaj partoprenantoj (kantadon, prelegon, instruadon de via lingvo...). Se vi bezonas iun specifan ekipon por via programero, kontaktu organizantojn anticipe.

Via kontribuo estos ankaŭ bonvena dum la **Internacia Vespero**, dum kiu vi povos prezenti vian landon, kulturon, lingvon per ia artaĵo (kanto, spektaklo, muziko...). Prepariĝu volonte por ĝi jam antaŭ la aranĝo, kunportante ekz. muzikon aŭ muzikilon, tradician vestaĵon de via lando aŭ regiono k.s.

12. Aldona /libera/ programo:

Krom la oficialaj programeroj, vi havas liberan elekton por propra, privata pasigo de tempo. En la urbo Nitra ekzistas pluraj atrakcioj kaj memstaraj festoj, pri kiuj eblas ekscii en urba turisma centro. En proksimeco estas i.a:

- la publika naĝejo „Na Sihoti“ en Nitra (ĉ. 1 km de la SES-ejo);
- publika boatado sur lago en la urba parko Na Sihoti (apud SES-ejo);
- promenoj tra la parko, vizito de muzeoj, galerioj, preĝejoj;
- saŭno, sportumado...;
- la burgo Gýmeš (ĉ. 11 km de Nitra).

13. Ekskursoj:

Detalojn pri ĉiuj ekskursoj vi trovos ĉe: <http://ses.ikso.net/2014/sk/Ekskursoj>

Tuttagaj ekskursoj, merkredo, la 16-an de julio (ambaŭ okazos samtempe, eblas do elekti nur unu el ili):

1. - Tuttaga ekskurso al Bratislava – ĉefurbo de Slovakio: la burgruino Devin, Bratislava kastelo, malnova urboparto, kaj io pli...

2. - Tuttaga ekskurso al Banská Štiavnica (la 16-an de julio)

Banská Štiavnica estas historia urbo en meza Slovakio, kun tre multkultura pasinteco. Ĝi estas konata per minado de metaloj (ĉefe de arĝento), per gravaj minejaj juro, administracio kaj akademia tradicio. La urbo mem estas enskribita en la Unesko-listo de kulturaj heredaĵoj.

Duontagaj ekskursoj:

- Urbo kaj kastelo Nitra (perpiede), (prezo: 7 EUR, dato: 2014-07-13)
- Topoľčianky, (prezo: 15 EUR, dato: 2014-07-15)
- Arboreto Mlyňany, (prezo: 10 EUR, dato: 2014-07-18)

Kaze ke vi ankoraŭ ne mendis la ekskursojn, aŭ volas ŝanĝi vian elekton (ankaŭ pro nia ŝanĝo kaj aldono de plua tuttaga ekskurso), faru tion laŭeble rapide (plej bone ĝis la 1-a de julio), ĉar la lokoj estas limigitaj. Vi povas mendi ilin aŭ informi pri ŝanĝoj sendante retmesaĝon al: dorota@ikso.net
Eblas tamen ankaŭ surloke (dum la registriĝo) ŝanĝi siajn ekskursojn, sed por faciligi la laboron ni petus informi nin prefere jam antaŭ la aranĝo.

14. Anĝeloj:

Dum la aranĝo tiel nomataj **anĝeloj** zorgos pri „novuloj“ = tiuj, kiuj ne ĉeestis ĝis nun internacian Esperanto-aranĝon. Anĝeloj havos alikoloran (flavan) nomŝildon kaj prezentiĝos dum la unua vespero.

Homoj-anĝeloj povas helpi al tiuj, kiuj estas novuloj pli bone orientiĝi dum SES: konsili al ili programerojn, klarigi aferojn, priparoli problemojn... Anĝeloj estas kutime spertaj esperantistoj, kiuj bone konas similajn aranĝojn. Ne hezitu alparoli anĝelon, se vi ekhavas iun ajn demandon aŭ malfacilaĵon, ĉar ili volonte pretas helpi al vi!

15. E-aranĝoj antaŭ kaj post SES SK 2014

Se vi volas somere pasigi pli da tempo en Esperanto-medio, ni rekomendas al vi viziti aranĝojn, kiuj okazas tuj antaŭ aŭ post SES:

antaŭ SES:

1. **EEU-kongreso** <http://eeu-kongreso.webnode.com/>

EEU (Eŭropa Esperanto-Unio) plezure invitas vin al la 10-a kongreso de EEU kiu okazos en Rijeka, Kroatio, inter la 6-a kaj la 12-a de julio 2014.

post SES:

2. IJS <http://ijs.hu/eo>

La 25-a Internacia Junulara Semajno okazos de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto en 2014 en [Horány](#), Szigetmonostor, Hungario ([nur 10 kilometrojn for](#) de Budapeŝto). Kiel jam pasintjare denove estos libera lagumado dum la tuta semajno! Krom tio, ĉar temas pri la jubilea naskiĝtago de IJS, frapfrazo de la semajno estos: "De la tradicioj ek al la futuro!" Denove okazos granda akvobatalo, kaj post pluraj jaroj de paŭzo, ree balo kaj festa manĝo kun jubilea torto (mmm..., ĉeestinde)!

3. SES-RU 2014 - <http://ses.ikso.net/2014/ru/>

Inter la 17-a kaj la 25-a de aŭgusto 2014 okazos ankoraŭ unu SES ĉi-jare, unua en Rusio, ĉi-foje apud Moskvo. Se vi emus plu lerni, praktiki la lingvon, aliĝu ankaŭ al la dua SES! Ĉiu, kiu partoprenos ambaŭ SES-ojn ricevos rabaton de 10 EUR dum la dua (rusa) SES de aliĝkoto, kaj krome taso-pason por 5 EUR por gufujo.

Ankaŭ nepre pripensu partopreni la antaŭkongreson en Moskvo mem, ekde la 14a de aŭgusto!

16. Kontaktoj:

Vi povas trovi kontaktojn de koncernaj respondeculoj ĉe <http://ses.ikso.net/2014/sk/Kontaktoj>

Ĝenerale ni petas kontakti nin rete, sed kaze de tre urĝa bezono dum via vojaĝo, vi ankaŭ povas kontakti organizantojn telefone:

Petro +421 902203369

Katka +421 948444380

Se vi havas ajnajn demandojn aŭ komentojn, bv. skribi al ses@ikso.net

Ĝis revido dum SES 2014 en Nitra,
Via SES-teamo

